FN PER AN C 47

# Normanda Esperanto Bulteno

Organe de l'Union des Esperantistes de Normandie

- N° 43 - - Marto 1958 -

Redaktas M. HUET, 63 Boulevard François 1er, LE HAVRE - Seine-Mme


## Editorial

Antaù unu jaro, mi memorigis tie-ĉi kion devas esti iu kongreso, kaj kion estis, ĝis nun, niaj normandaj kongresoj. Mi deziris ke la Caen'a kongreso estu "aliaĵo" ol amikeca kunveno.

Ve... Neniu kongreso estis tiel senbrila! KIAL? - Ĉu la organizintoj malbone laboris? - NENIEL: ili laboris multe. Sed, kiam oni scias ke nur sep-dek Esperantistoj partoprenis ĝin, tiam oni estas trovinta la kialon de la preskaù-fiasko.

"Oni elektis maltaùgan daton... Ni estis forprenitaj de antaùaj promesoj, ktp.." Tial la L. K. K. en Havro fiksis, tuj de Oktobro, la daton de la 27-a kongreso. Tiamaniere, la normandaj Gesamideanoj havos nenian kaùzon por pardonigi sian nepartoprenon.

Certe, la vojaĝoj multekostas, sed, kie ekzistas grupo, tie oni kapablas malpliigi la koston per kuneco de pluraj personoj. Ekzemple, "S.N.C.F." konsentas rabaton por 10 vojaĝantoj. Kaj, se vi estas multnombraj, vi povos lui aùtobuson. Por krei karavanon, la grupestroj petos de amikoj ĉu ili deziros veturi Havron; se la kongreso mem ne interesas ilin, la tuta vizito al la granda rekonstruita urbo kaj ĝia fama haveno certe allogos ilin. Kaj, nia kongreso estas jara ... nur!



NIA AFERO IRAS SUR SUKCES-VOJO! Nun, la aùtoritatoj rigardas Esperanton, ne kvazaù utopion, sed kiel realaĵon? Tial, ni nepre devas montri niajn fortojn. Ne forgesu ke la gazetistoj ĉeestas niajn kongresojn! Ne estas penseble ke ili konsideru nin kiel seriozulojn kiam ili vidas sep dek partoprenantojn en regiona kongreso. Ili diras (kaj, pligrave: skribas) "la Normanda Esperantistaro konsistas el ... sep-dek anoj!"


<u>Se ni ja volas iri antaùen, eta peno plene urĝas.</u>

NECESAS ke Pierre DELAIRE parolu en plenplena ĉambro. (Ni invitos eminentulojn.)

NECESAS ke, dum la inaùguro de Strato ZAMENHOF, la Urbestro de Havro vidu, apud li, ampleksan delegitaron de la Normanda Esperantistaro. En letero, per kiu mi petis la urbestron ke li akceptu la honor-prezidecon, mi konfide skribis la nombron je (almenaù) cent kvin-dek partoprenontoj. Geamikoj! Mi admonas vin: ne puntrudu al mi oficialan kontraùdiron!

VI AMASE KUNPORTOS al mi VIAN RESPONDON ...

BONVENON al ĉiuj en la OCEANA PORDO!



Maurice HUET
L.K.K.-Prezidanto
U.N.E-vicprezidanto.

EVREUX = Mortis, la 25-an de Januaro, la patrino de nia Samideanino MONTAGNÉ. Niajn sincerajn kondolencojn.

LE HAVRE = Nia Samideano Paul MARY malfermis novan kurson en ekstera kvartalo "Aplemont", kun 12 gelernantoj. Niajn gratulojn!

ROUEN = Sukceso de la monataj kunvenoj de la grupo. = S-ro Roland DUPUIS, Rouen'a Esperantisto vivanta en Svedujo, komencis en Januaro novan rondvojaĝon tra norda Svedujo, por prezenti fortepiano-koncertojn.

LES ANDELYS = S-ino Jeannine LE GOFF organizis internacian korespondoservon.

FECAMP = Ni redonu al Cezaro... Sekve de preseraro en gazeto, oni anoncis ke la urba subvencio estis malplimultigita; male, tiu-ĉi estis plialtigita. Dankon al la urba magistrato.
- La 18-an de Jan. la grupo festis, kiel kutime, la "Tri Reĝojn" en familia rondo. La partoprenantoj ĝojis pro la ĉeestado de S-ro LAMAUVE el Auffay, Prezidinto de la grupo k S-ro VILETTE el Evreux. Bela k gaja festo ĝi ja estis, kie gegrupanoj novaj konatiĝis kun malnovaj, dum la festeno, la balo kaj la amuzaĵoj.
- Nia klubanino F-ino LAMY, irante Tirolon pri la vintraj sportoj, vizitis S-inon KUMASCH-CORDONNIER nia eks-sekretariino loĝanta en Innsbrück. Tiu lasta bone akutimiĝis al la tiea vivo k bone ĝojas pri la neĝo. Ŝi amike salutas la normandajn Esperantistojn.
- La grupo elektis la estraron por la nuna jaro jene: Prez. S-ro PERMANNE; V/Prez. POTTIER R.; Sekr. F-ino TURMEL; Helpsekr. F-ino LEGROS; Kasist. F-ino JILLET; Helpkasist. k arkivist S-ino PERMANNE; Delegit. pri propagando: F-ino COMTE; Delegitinoj pri artoj: F-inoj LAMY k BREANT; Kursestro: S-ro Pierre POTTIER.
- Jam de longe, la kasistino de U.N.E. ricevis la kotizo[illegible]n de ĉiuj samideanoj Fecampaj. Ĉu la grupo en Fécamp estas la sola kiu scias ke oni devas pagi la kotizojn tuj de la komenco de l'jaro? (Tiun informon sendis la kasistino de U.N.E.)

ST. LAURENT-de-BREVEDENT = Nia Samideano LETENDRE malfermis novan kurson specialan por infanoj. Li ankaŭ promesis baldaŭan bonan novaĵon ... Sed, ni silentu!

BAYEUX = La 5-an de Dec. S-ro Bénistant, Inspektoro pri Publika Edukado faris prelegon. La artista grupo de F-ino Chérie prezentis teatraĵeton: Blubarbulo. Fine, oni projektis filmon. La multaj infanoj tre ĝuis la spektaklon.

CAEN = Ekspozicio en montro-fenestro en la [illegible] M. J.

---

## LA KURSOJ

| Lokoj | N. da kursoj | N. gelernant. | Gvidantoj |
|---|---|---|---|
| EVREUX | 1 | 20 | F-ino Montagné (F-ino Jillet |
| FECAMP | 5 | 29 | S. Permanne, Pottier, Pastro Ecue |
| LE HAVRE | 6 | 35 | S-inoj Lavallée k Amiard, S-roj Noel, Mary k Huet. |
| MEZIDON | 2 | 2 | S-ro Chatelain |
| ST. LAURENT-DE-BREVEDENT | 2 | 20 | S-ro Letendre |
| SOTTEVILLE-lès-ROUEN | 2 | 20 | S-roj Quillau k Martin |
| VIRE | 3 | 21 | S-roj Sapeyras k Sohier |
| CAEN | 1 | 5 | S-ro Duthilleul |
| LE MANOIR (Eure) | 1 | 25 | S-ro Pigné |

# KONGRESO

## LE HAVRE

SALLE MUNICIPALE, 44 Rue Jules Lecesne

la 17-an de Majo 1958, je 20 h.30



"PRESENTATION DE L'ESPERANTO, parolado de S-ro Pierre DELAIRE

Kiu estas Pierre DELAIRE? - Pierre Delaire naskiĝis antaŭ 37 jaroj... Li fariĝis Esperantisto je la 13-a jaro. Lernanto en liceo, li daŭrigis siajn studadojn k, 3 jaroj poste, li verkis kaj publikigis la unuan eldonon de sia libro "l'Esperanto en 12 leçons". Poste, diplomigita de Institut Français d'Esperanto, li komencis regulan kurson ĉe la nacia radio. - Dum la okupado, kvankam Esperanto estu malpermesata, li publikigis du librojn pri Esperanto, sen la vizo de la Germanoj, kompreneble! Fine, la Libereco de nia lando permesis al Pierre Delaire efektivigi sian malnovan revon: okupi sin pri Esperanto nur. Kaj li kreis la "Centre National Esperanto-Office".

Agrabla preleganto, lian allogan paroladon certe ĝuos la ĉeestontoj, Esperantistoj, ne-Esperantistoj kaj eĉ (kial ne?) la kontraŭuloj.

Ni memorigas al vi ke, dum tiu kunveno, vi povos aŭdi la voĉojn de Georges DUHAMEL kaj Maurice GENEVOIX (anoj de Franca Akamedio), de Raymond SOUPLEX, BOURVIL, Marguerite SANTREUIL, k.t.p.. Vi ankaŭ vidos la fiksan filmon: "Si l'Esperanto vous était révélé".

la 18-an de Majo 1958

9 h. 30.- Labor-kunsido - 12 h.- Foto - 12 h.30.- Komuna tagmanĝo en restoracio - de 14h ĝis 17 h.- Vizito de la Urbo kaj haveno. Dum la vizito (proksimume je 15 h. 30): INAŬGURO DE STRATO ZAMENHOF, sub efektiva prezideco de la Urbestro

## Attention !

Pour l'organisation de la visite, il est indispensable de connaître, au plus tôt, le nombre des participants. Adressez dès maintenant votre cotisation (400Fr, enfants jusqu'à 14 ans: 250Fr) au trésorier du Congrès, S-ro LESTERLIN, LE HAVRE - C.C.P. 849-74 ROUEN (formule ci-jointe), auquel vous pouvez également commander des vignettes (3 couleurs) au prix de 100Fr les 6 séries de 3; ajouter 20Fr pour frais d'envoi.

-PHILATELISTES .. Vous pourrez acquérir au Kongresejo une carte-souvenir, affranchie avec le nouveau timbre "LE HAVRE", oblitéré avec le cachet spécial "PREMIER JOUR".

* * * * *

AVEZ-VOUS PAYE VOTRE COTISATION 1958 à l'UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE (100 Fr)
32 Rue de Bayeux - CAEN. C.C.P. 283-40 ROUEN.

N.B.- L'administration des chèques-postaux adresse les titres de paiement directement à la trésorière. Ainsi le Président ne peut prendre connaissance de la correspondance que vous pouvez lui adresser sur les mandats.